

# Jack London



bildigis Posada

## La meksikano Felipe Rivera

- rakonto -

## I

Neniu sciis lian historion – liaj kunkonspirantoj plej malmulte. Li estis ilia „malgranda sekreto“, ilia „granda patrioto“, kaj je lia maniero li laboris same tiom je la venonta meksika revolucio kiel ili. Daŭris longe ĝis ili ekkonis tion; ĉar eĉ ne unu en la revolucia konsilio ŝatis lin. Je la tago, kiam li unuafoje enpaŝis en la ĉambrojn plenŝtopitajn per agemaj homoj, ĉiuj suspektis lin – ke li estas spiono en la servo de la sekreta polico de Diaz. Tro multaj el liaj kamaradoj troviĝis ĉirkaŭe en Usono en civilaj kaj militaj prizonoj, kaj aliaj ĝuste en tiu tempo estis kondukitaj translimen kaj pafmortigita ĉe muro.

Je la unua rigardo la junulo ne bone impresis ilin. Li ne estis pli olda ol dekok jarojn, ne tre granda kaj klarigis, ke li nomiĝas Felipe Rivera kaj, ke li volas labori por la revolucio. Tio estis ĉio – neniu plia vorto. Sed li restis stari atendente. Neniu rideto estis ĉirkaŭ lia buŝo, neniu amindeco en la okuloj. La granda verva Paulino Vera sentis internan hororon. Ĉi tie estis io abomena, terura, neesplorablebla. Io venena, serpenteca estis en la nigraj okuloj de la junulo. Ili brulis kiel frida fajro kaj samtempe en kolosa ŝlifita incitiĝo. De la vizaĝoj de la kunkonspirantoj li lasis vagi la rigardon al la skribmaŝino, ĉe kiu sidis la malgranda ino Sethby, fervore laboranta. Liaj okuloj serĉis ŝiajn, sed nur por sekundo – ŝi levis hazarde la rigardon -, kaj ankaŭ ŝi havis nedifineblan strangan senton, kiu interrompis ŝian laboron. Ŝi devis ankoraŭfoje tralegi la skribitan, por povi fintajpi la leteron, pri kiu ŝi ĵus okupiĝis.

Paulino Vera rigardis demandante al Arrellano kaj Ramos, kaj ili rigardis sin reciproke senkonsile. En ilia rigardo estis necerteco kaj dubo. Tiu ĉi magra vizitanto estis la nekonato, kaj ĉiel minacanta malkomforto de nekonato

ĉirkaŭis lin. Oni tute ne povis kompreni lin, li estis tiom transa de la horizonto de tiuj ĉi honorindaj simplaj konspirantoj. Ili sovaĝa hato kontraŭ Diaz kaj lia tiraneco estis la hato de honorindaj, simplaj patriotoj.

Sed ĉi tie estis io alia, io pli forta, ili kompreneble ne sciis bone, kio. Sed Vera, kiu ĉiam estis la plej decida kaj plej agoforta, kaptis la bovon ĉe la kornoj.

„Bone“, li diris sobre. „Vi diras, ke vi volas labori por la revolucio. Demetu vian jakon! Pendigu ĝin tien. Mi montros al vi – venu - , kie estas la siteloj kaj viŝĉifonoj. La planko estas malpura. Vi tuj povas komenci viŝi ĝin ĉi tie kaj en la aliaj ĉambroj. Ankaŭ la kraĉujoj bezonas purigadon. Kaj krome la fenestroj.“

„Ĉu ĝi estas por la revolucio?“ demandis la junulo.

„Por la revolucio!“ respondis Vera.

Rivera rigardis ilin ĉiujn frida kaj misfida kaj tiam demetis sian jakon.

„Estas bone“, li diris.

Nenion plu. Tagon post tago li venis al sia laboro, - balais, lavbrosis kaj purigis ion. Li prenis la cindron el la forno, alportis karbojn kaj lignon kaj faris fajron kaj li estis la unua en la oficejo.

„Ĉu mi rajtas dormi ĉi tie?“ li demandis foje.

Aha! Jen- la mano de Diaz ekaperis. Se li dormus en la ĉambroj de la konsilio, tio signifus, ke li havus aliron al iliaj sekretoj, al la nomlistoj, al la adresoj de la kamaradoj en Meksiko. Oni rifuzis la peton, kaj Rivera neniam plu demandis pri tio. Li dormis, sed kie? Li manĝis. Sed kie kaj kion? Unufoje Arrellano ofertis kelkajn dolarojn al li. Sed Rivera rifuzis la monon. Kiam Vera alpaŝis, kaj provis altrudi ĝin, li diris: „ Mi laboras por la revolucio.“

Antaŭprepari revolucion kostas monon, kaj la konsilio ĉiam estis en embaraso pri mono. La membroj malsatis kaj laboris ĝis laciĝego, la plej longa labortago ne estis sufiĉe longa por ili, kaj tamen ŝajnis iafoje, kvazaŭ ĉio starus kaj falus kun la demando kiel havigi kelkajn dolarojn.

Unufoje -estis la unua fojo, ke ili ŝuldis du monatojn da luo, kaj la loĝejmastro minacis elĵeti ilin - estis Felipe Rivera, la purigista knabo en la aĉaj trivitaj vestoj, kiu metis sesdek dolarojn da oro sur la pupitron de May Sethby. Kaj same tiel ĉe aliaj okazoj. Tricent leteroj klake tajpitaj sur la okupataj skribmaŝinoj (Petoj pri subteno, pri agnosko de amikaj grupoj, urĝaj petoj al redaktoroj pri bonvolemaj mencioj kaj tiel plu) restis sur la tabloj kaj atendis pri afranko. La horloĝo de Vera malaperis – la malnova ora ripethorloĝo, kiun li heredis de lia patro. La glata ora ringo je la ringofingro de May Sethby malaperis same. Estis malesperige, Ramos kaj Arrellano ŝiris kolere siajn longajn lipharojn. La leteroj devis eliri, kaj ĉe la poŝtejo ne estis kredito por la aĉetado de poŝtmarkoj. Jen Rivera surmetis la ĉapelon kaj foriris. Kiam li revenis, li metis mil poŝtmarkojn po du cendoj sur la pupitron de May Sethby.

„Mi volus scii, ĉu la malbenita mono estas de Diaz?“ diris Vera al la kamaradoj.

Ili tiris la palpebrojn supren, sed ne kuraĝis, respondi la demandon. Kaj ĉiam estis Felipe Rivera, kiu havigis al la konsilio oron kaj arĝenton, se tio estis necesa.

Sed ili ne ŝatis lin, kaj ili ne konis lin. Li iris siajn proprajn vojojn, ne fidis al ili, kaj malakceptis ĉiujn provojn pri proksimiĝo. Kaj spite al lia juneco neniu ekkuraĝis eldemandi lin.

„Li tute ne estas homo“, diris Ramos.

„Lia animo estas elsekigita“, diris May Sethby. „Li ne povas ridi. Li similas al mortinto kaj estas tamen terure vivanta.“

„Li iris tra la infero“, diris Vera. „Tiel oni aspektas nur, se oni estas irinta tra la infero – kaj ĉe tio li estas ankoraŭ tiom juna.“

Felipe neniam parolis, neniam demandis, neniam proponis ion. Li auŝkultis sen esprimo kiel morta objekto, sed liaj okuloj lumis en frida brilo, se la aliaj laŭte kaj pasie parolis pri Meksiko. Tiam liaj okuloj glitis de vizaĝo al vizaĝo, de parolanto al parolanto, trapenetre kaj explore kaj kun trembrilo kiel brilanta glacio, kiu ĝenis ilin, kaj kio ŝetis ilin el la memrego.

„Li ne estas spiono“, konfidis Vera al May Sethby. „Li estas patrioto – kreu al mi, la plej granda patrioto el ni ĉiuj. Mi scias tion, mi sentas ĝin. Sed pri li mem mi scias eĉ ne la plej malgravan.“

„Li havas danĝeran temperamenton“, diris May Sethby.

„Mi scias“, diris Vera kun sento de hororo. „Li rigardis min per tiuj okuloj. Ili ne parolas pri amo, ili minacas kaj estas sovaĝaj kiel tiuj de tigro. Se mi perfidus nian aferon, li mortigus min, tion mi scias. Li ne havas koron. Li estas senkompata kiel ŝtalo, akra kaj frida kiel frostoj. Mi timas nek Diaz nek ĉiujn liajn murdistojn, sed tiun Rivera mi timas. Estas vere. Mi timas lin.“

Tamen estis Vera, kiu persvadis la aliajn doni al Rivera la unuan taskon postulantan konfidon. La kontakto inter Los-Anĝeleso kaj la suda Kalifornio estis interrompita. Tri el la kamaradoj devis fosi siajn proprajn tombojn kaj tiam oni pafmortis ilin. Du pliaj estis prizonuloj de Usono en Los-Anĝeleso. Juan Alvarado, la federacia generalo trakrucis ĉiujn iliajn planojn. Ili ne plu povis ligi kontakton al la aktivaj revoluciuloj kaj kun la ekaktivaj kamaradoj en la suda Kalifornio.

La juna Rivera ricevis ordonojn kaj estis sendata al la sudo. Kiam li revenis, la kontakto estis religita kaj Juan Alvarado estis morta. Oni trovis lin kun tranĉilo en la brusto en la lito. Tio transiris la instrukciojn al Rivera, sed oni ne demandis lin, kaj li diris nenion. Sed ili rigardis sin reciproke kaj havis sian opinion pri tio.

„Mi diris tion al vi“, opiniis Vera. „Diaz devas timi tiun junan viron pli ol iun ajn alian. Li estas nepacigebla.“

La danĝera temperamento, pri kiu May Sethby parolis, kaj kiun ĉiu el ili rimarkis, montriĝis ankaŭ en alia rilato. Jen li aperis kun disŝirita lipo, jen kun blue kaj brune batita vango, jen kun ŝvelinta orelo. Estis klare, ke li ie en tiu mondo, en kiu li manĝis kaj dormis kaj havigis monon al si kaj vivis vivon, pri kiu ili sciis nenion, ke li do en tiu mondo havis ofte kverelon. Post kelke da tempo li fariĝis kompostisto en la revolucia semajngazeteto, kiun ili eldonis.

Ĉeokaze ne estis ebla al li komposti ion, ĉar liaj ostetoj estis defrotitaj kaj disbatitaj, ĉar liaj dikfingroj estis dispremitaj kaj senhelpaj aŭ ĉar liaj brakoj pendis senforte malsupren, dum lia vizaĝo tordiĝis en silenta doloro.

„Stratbubo“ diris Arrellano.

„Drinkulo kaj pugnoheroo“, diris Ramos.

„Sed de kie li ricevas la monon?“, demandis Vera. „Mi ĵus eksciis, ke li pagis la paperkalkulon – cent kvardek dolarojn.“

„Li ja ofte estas for“, diris May Sethby, „kaj li donas neniam klarigon.“

„Ni observu lin“, proponis Ramos.

„La spiono mi ne volus esti“, diris Vera. „Mi timus, ke vi neniam denove vidus min, krom ĉe mia entombiĝo.“

„Rilate al li, mi ĉiam havas la senton esti infano“, konfesis Ramos.

„Por mi li estas potenco – la sovaĝa lupo – la kappuŝanta sonserpento“, diris Arrellano.

„Li konas neniun“, diris May Sethby. „Li hatas ĉiujn. Li estas sola... soleca.“

La agadoj kaj la okupoj de Rivera estis vere sekreto. Estis tempoj, kiam ili ne vidis lin dum semajno. Unufoje li restis for dum tuta monato. Tio estis tiom pli enigma, ĉar li ĉiam metis ĉe sia reveno senforte ormonerojn sur la pupitron de May Sethby. Alitempe li pasigis tagojn kaj semajnojn, sian tutan

tempon ĉe la konsilio. Kaj en alia tempo li eble malaperis dum necerta tempo de la frua mateno ĝis vespere. En tiaj tempoj li venis malfrue kaj restadis longe. Arrellano estis vidinta lin noktmeze, kiel li staris kun ŝvelintaj ostetoj kaj diŝirita lipo, kiu ankoraŭ sangis, ĉe la literkesto.

## II

La decido proksimiĝis. Ĉu okazus ribelo aŭ ne, tio dependis de la revolucia konsilio, sed la konsilio troviĝis en granda embaraso. La monbezono estis pli granda ol iam, kaj ĉe tio fariĝis pli kaj pli komplike havigi monon. La patriotoj donis sian lastan cendon kaj ne plu posedis ion. La laboristoj, vivantaj en la ekzilo, donis la duonon de sia mizera salajro. Sed oni bezonis pli da mono. La streĉiga laboro de la revoluciuloj dum jaroj alportu baldaŭ fruktojn. La tempo estis veninta. Ankoraŭ puŝo, ankoraŭ lasta heroa streĉigo, kaj la venko estis sekurigita. Ili konis sian Meksiko. Unufoje ekirigite la revolucio per si mem prenis sian kuron. La limregionoj estas pretaj por la ribelo. Usonano kun cent viroj atendis la vorton por transpaŝi la limon. Sed li bezonis fusilojn. En la tuta lando ĝis la Atlantiko la konsilio flegis ligojn, kaj ĉiuj ili bezonis fusilojn: Aventuristoj, kavaliro-hazardistoj, banditoj, seniluziiĝintaj usonaj sindikatanoj, kaj la multaj meksikanaj ekzilitoj, peonoj fuĝintaj de la sklaveco, minolaboristoj, kiujn oni skurĝis en la prizonoj de Coeur d' Alene kaj Kolorado, kaj kiuj tial estis precipe venĝoavida kaj batalema – vrakuloj kaj borden ĵetitaj konfuzaj spiritoj el rabiiĝinta mondo. Fusiloj kaj municio! Fusiloj kaj municio! Tiujn vortojn ili ĉiuj vokis seninterrompe.

Se tiu ĉi bankrotiĝinta, venĝoavida bando estus ĵetita trans la limon, la revolucio tuj marŝus. La doganajn oficejojn, la nordajn importhavenojn oni konkeris. Diaz devis teni la ĉefan forton de sia armeo en la sudo de la lando,



ĉar ankaŭ en la sudo la ribelo ekus. Urbo post urbo devus kapitulacii, federacia ŝtato post federacia ŝtato devus ekŝanceliĝi kaj kolapsi. Kaj laste venus la marŝo de la venkanta revolucio al Meksikurbo. Sed la mono! La virojn ili havis, kaj tiuj atendis senpacience la fusilojn. Ili konis la komercistojn, kiuj vendu kaj liveru fusilojn al ili. Sed la konsilio elĉerpis sian forton. La lasta dolaro estis eldonita, la lasta helpofonto, la lasta malsatanta patrioto elsuĉita, kaj la granda afero ankoraŭ nun tecomante ŝvebis sur la pesilo de la decido. Fusiloj kaj municio! Oni devis armi la ĉifonitajn batalionojn. Sed kiel? Ramos veis pri sia konfiskita posedaĵo. Arrellano lamentis pri la disipo, kiun li ekzercis en sia juneco. May Sethby cerbumis, ĉu ne ĉio estus irinta pli bone, se la membroj de la konsilio pli frue estus estintaj pli ŝparemaj.

„La penso frenezigas min, ke la libero de Meksiko pro kelkaj miloj da aĉaj dolaroj aŭ saturiĝu aŭ falu!“ diris Paulino Vera.

La vizaĝoj de ĉiuj esprimis desperon. José Amarillon, ilian lastan esperon, ĵuskonvertiton, kiu promesis monon al ili, oni kaptis en sia haciendo en Chihuahua kaj pafmortis lin je sia propra stalomuro. La mesaĝo ĝuste estis alveninta.

Rivera, kiu surgenuis kaj frotlavis la plankon, rigardis supren, kun la viŝĉifono en la mano kaj kun nudaj etenditaj brakoj kotŝpruĉitaj de la sapoakvo.

„Ĉu kvinmil da sufiĉus?“ li demandis.

Ili fikse rigardis lin, Vera kapjesis kaj glutis, li ne povis eligi vorton, sed nova espero vigligis lin.

„Mendu la fusilojn“, diris Rivera, kaj tiam li permesis al si la plej longan paroladon, kiun ili iam aŭskultis de li. „Ne estas multe da tempo, post tri semajnoj mi alportos al vi la kvinmilon. Tio estas sufiĉe frue. Tiam estos pli varme por tiuj, kiuj batalu. Kaj krome, pli rapide mi ne povus fari tion.“

Vera batalis kun si mem. Tro da espero jam frakasiĝis, de kiam li ĉeestis, sed li fidis la ĉifonitan frotlavan junulon de la revolucio kaj tamen ne kuraĝis fidi lin.

„Vi estas freneza“, li diris.

„Post tri semajnoj“, diris Rivera. „Mendu la fusilojn.“ Li ekstaris, ŝovis la manikojn de la ĉemizo malsupren kaj surmetis la jakon.

„Mendu la fusilojn“, li diris. „Mi nun foriras.“

### III

Post longa debato, sennombraj telefonaj interparoloj kaj senfinaj sakroj oni kunsidis en la nokto en la kontoro de Kelly. Kelly enestis ĝis la oreloj en negocoj, kaj krome li malbonŝancis. Li kontrakte devigis sin por Danny Ward el Nov-Jorko, kaj li aranĝis boksbatalon inter li kaj Billy Carthey, kiu okazu post tri semajnoj. Kaj nun Carthey devis kaŝi sin antaŭ la sportreporteroj, pro kruda vundiĝo li devis resti en la lito. Ne estis iu alia, kiu povus anstataŭi lin. Kelly kiel freneziĝinte telegrafis pro akceptebla boksisto leĝere peza en oriento, sed ĉiuj pro interkonsentiĝoj kaj kontraktoj estis ligitaj. Sed nun li havis esperon, se eĉ nur malgrandan.

„Vi havas multe da kuraĝo!“ diris Kelly al Rivera.

En la okuloj de Rivera ekfulmis malice, sed la vizaĝo konservis sian neskueblan, fridan esprimon.

„Mi povas nokaŭti lin“, estis ĉio, kion li diris.

„Kiel vi povas scii tion? Ĉu vi iam vidis lin boksi?“

Rivera nee skuis la kapon.

„Per unu mano kaj fermitaj okuloj li faros kaĉon terpoman el vi.“

Rivera suprentiris la ŝultrojn.

„Ĉu vi havas nenion por diri pri tio?“ grumblis la aranĝisto.

„Mi povas nokaŭti lin.“

„Ĉu vi efektive jam iam boksbatalis?“ demandis Mikaelo Kelly. Mikaelo estis la frato de la aranĝisto, li posedis la Yellowstone-oficejo kaj enspezis multe da mono je la boksbataloj.

Rivera grumblis furioze.

La sekretario, junulo de karakteriza sportista tipo, tusetis mokege.

„Nu, vi ja konas Roberts“, rompis Kelly la embarasigan silenton. „Li jam povintus esti ĉi tie. Sed sidiĝu kaj atendu, ankaŭ se vi ne havas bonajn ŝancojn laŭ via aspekto. Mi ne povas oferti trompan maĉon. La lokoj ĉe la ringo estas pagataj per dekkvin dolaroj, kiel vi eble scias.“

Kiam Roberts alvenis, li evidente estis ebrieta. Li estis alta, svelta, ŝanceliĝa homo, kaj lia iro estis kiel lia parolo, trankvile kaj treniĝeme.

Kelly tuj celis la kernon de la afero.

„Diru foje, Roberts, vi ja fanfaronis pri la trovo de tiu ĉi malgranda meksikano. Kiel vi scias, rompis Carthey la brakon al si. Kaj nun tiu malgranda flava ulo havas la impertinentecon, hodiaŭ veni ĉi tien kaj diri, ke li volas iri por Carthey en la ringon. Kion vi pensas pri tio?“

„Jam en ordo, Kelly“, estis la treniĝanta respondo. „Li povas boksi.“

„Vi ja ne eble volas konvinki min pri tio, ke li povas venki Ward-on“, diris Kelly atakeme.

Roberts pripensis la aferon.

„Ne, tion mi ne volas aserti. Ward tute ne estas venkebla. Sed li ankaŭ ne tuj venkos Riveran. Mi konas Rivera. Li neniam nudigas sin, mi almenaŭ ankoraŭ ne vidis tion. Kaj li boksas per ambaŭ manoj same bone. En ĉiu pozicio li povas meti svenigajn batojn.“

„Nu bone, sed kiun ŝancon li havas? Vi trejnis vian tutan vivon boksistojn. Mi demetas mian ĉapelon pro viaj fakaj konoj. Ĉu li povas doni ion al la publiko por la mono?“

„Tion li povas certe, kaj al tio li faros multajn problemojn al Ward. Vi ne konas la knabon, sed mi konas lin. Mi malkovris lin. Li ne havas malfortan flankon. Li estas la pura diablo. Se iu demandas vin, vi povas diri, ke li estas sorĉista majstro. Ward kaj vi ĉiuj ege miros. Mi ne volas aserti, ke li venkos Wardon, sed ĉiukaze li montros siajn kapablojn, tiel, ke vi ĉiuj vidos la novan viron en li.“

„Bone“. Kelly turnis sin al la sekretario. „Telefonu Wardon. Mi promesis al li, se indus la penon. Li estas ĝuste transe en la Yellowstone-oficejo kaj kiel kutime vetludas.“ Kelly turnis sin al Roberts.

„Kion trinki?“

Roberts trinketis el sia glaso kaj elverŝis sian koron. „Mi ja ankoraŭ ne rakontis al vi kiel mi trovis la junan ulon. Antaŭ kelkaj jaroj li aperis en la kampejo. Mi ĵus trejnis Prayne por la batalo kontraŭ Delanay. Prayne estas fia ulo. Ne estas eĉ fajrero da kompatato en li. Li terure lezis sian partneron, kaj mi povis trovi neniun, kiu havis la emon trejni kun li. Jen mi rimarkis tiun malgrandan elmalsatigitan meksikanon, kiu ĉiam vagadis ĉi tie kaj observis ĉion. Mi estis malesperiĝinta kaj ne sciis kion fari. Jen mi tiris lin al mi, surmetis al li la boksgantojn kaj puŝis lin en la ringon. Li estis pli rezistema ol tanita ledto, sed malforta. Kaj ĉe tio li ne sciis eĉ literon de la alfabeto de la boksarto. Prayne faris pomokaĉon el li. Sed li tamen eltenis du rondojn, antaŭ ol li laciĝis. Estis nenio alia krom malsato. Ĉu li estis frakasita? Vi ne estus rekoninta lin. Mi donis al li duonan dolaron kaj ion bonan por manĝi. Vi devus esti rigardinta lian lupecan malsaton, kiam li voris ĝin. De tagoj li ne manĝis eĉ nur buŝplenon. Nun li estas sata pri la boksado, mi pensis. Sed je la venonta tago li revenis, rigida kaj vundita, sed avida je tio denove perlabori

duonan dolaron kaj bonan tagmanĝon. Kaj iom post iom li fariĝis pli kaj pli kapabla. Li estas la naskita boksisto kaj nekredeble obstina. Li ne havas koron. Li estas la pura pendoglacio. Kaj en la tuta tempo, kiam mi jam konas lin, ni parolis eĉ ne nur dek vortojn kune. Li ne babilaĉas, sed li faras sian laboron.“

„Mi vidis lin“, diris la sekretario. „Li laboris sufiĉe ofte por vi.“

„Ĉiuj tiuj grandaj bubetoj provis ĝin kun li“, respondis Roberts. „kaj li lernis de ili. Mi vidis tion kelkajn fojojn, kiel li tradraŝis ilin. Sed li neniam metis sian tutan animon en tion. Mi pensas, ke li neniam vere ŝatis tiun ludon. Almenaŭ tio tiel aspektas.“

„Li batalis en la lastaj monatoj sufiĉe ofte en la malgrandaj kluboj.“

„Tio pravas. Mi ja ne scias, kio nun obsedigas lin. Subite li malkovris sian koron por tio. Li atakis kiel furioze kaj venkis ĉiujn regionalajn heroojn. Ŝajne li bezonis monon kaj ankaŭ gajnis atentindan sumeton, eĉ se oni ne vidas tion je liaj vestoj. Stranga homo! Neniu scias, kion li faras kutime. Neniu scias, kie li pasigas sian tempon. Meze en la laboro li subite forkuras kaj malaperas por la resto de la tago. Kelkfoje li restas for dum semajnoj. Sed oni povas diri kion ajn, li ne atentis tion. Riĉo atendas je la viro, kiu scias meti lin sub kontrolon, sed li ne volas lasi diri ion al si. Atentu foje precipe pri tio, kiom multe li celas la monon, se vi interkonsentas kun li la kondiĉojn.“

Ĝis tien progresis la interparolado, kiam Danny Ward enpaŝis. Nun estis tuta societo. Lia manaĝero kaj lia trejnisto estis venitaj kun li, kaj abunde karesema. Bonkora kaj akiranta simpation, kiel li estis, li kunportis freŝan spiron. Danny salutis ĉiujn, havis por ĉiu ŝercon, humuran respondon,

rideton aŭ ridon. Tio estis ja lia maniero, sed ĝi estis ne tute aŭtentika. Li estis bona aktoro, kaj li malkovris, ke karesmo ne estas malestiminda, se oni volas fari karieron en la mondo. Sed sur la fundo de lia animo li estis sobra, sangofrida interbatemulo kaj negocisto. Ĉio alia estis masko. Kiu konis lin aŭ faris negocojn kun li, diris, ke Danny ne lasas mistifiki sin, se tio estas decida. Li estis neeviteble ĉeestanta ĉe ĉiuj negocaj interparoloj kaj kelkaj asertis, ke lia manaĝero estis nur ŝajnulo, kies tasko estas servi kiel laŭtparolilo.

Rivera estis tute alia. En liaj vejnoj fluis la sango de indiĝenoj kaj de hispanoj. Li sidis silente kaj senmove en angulo en la fono, kaj nur liaj okuloj glitis de vizaĝo al vizaĝo kaj observis ĉion.

„Tio estas do la junuleto, diris Danny kaj taksante lasis vagi sian rigardon laŭ la venonta kontraŭulo. „Kiel statas, olduleto?“

La okuloj de Rivera briltremis malice, sed li ne moviĝis. Li povis flari neniun gringon, sed tiun li hatis tiel senpere, kiel tio estis nekutima eĉ ĉe li.

„Dio mia!“ Danny protestis gaje turniĝante al Kelly. „Vi ja ne eble volas, ke mi batalas kontraŭ surdmutulo.“ Kiam la ridado trankviliĝis, li denove atakis lin: „Pri Los-Anĝeleso devas stati malbone, se tio estas la plej bona, kion vi povas prezenti. El kiu infanĝardeno vi plukis lin?“

„Li estas bonkondata knabeto, Danny, fidu pri tio“, diris Roberts. „Li ne tiel facile venkeblas kiel tio ŝajnas.“

„Kaj la halo jam je duono estas elvendata“, diris Kelly insiste. „Vi devos provi tion kun li, Danny. Ni ne plu povas fari ion alian.“

Danny ĵetis plian fojon neglekteman kaj ne vere flateman rigardon al Rivera kaj ĝemis.“

„Mi devas trakti lin iom gardeme, mi supozas. Se li nur ne tute finiĝas ĉe tio!“

Roberts ridis laŭte.

„Vi devas atenti“, avertis la manaĝero de Danny. „Oni ne povas scii ĉe tia novulo, kion li kapablas elpafi.“

„Ho, mi ja gardos min“, ridete diris Danny. „Mi tuj prenos lin en mian flegon, por ke la kara publiko havu ion de tio. Kion vi pensas pri dekkvin da rondoj, Kelly? - Kaj mi ja ĉasos lin.“

„Tio sufiĉas“, vortiĝis la respondo. „Vi devas fari tion nur iom reala.“

„Do, ni parolu pri la negoco.“

Danny eksilentis kaj postkalkulis. „Memkompreneble sesdek kvin procentojn, kiel kontraŭ Carthey. Sed alia dispartigo. Okdek procentojn por mi – tiel tio estos en ordo.“ Kaj turniĝinte al sia manaĝero: „Ĉu ne tiel?“ - Tiu kapjesis.

„He, vi tie, ĉu vi komprenis tion?“ demandis Kelly al Rivera.

Rivera skuis la kapon.

„Do, la afero estas tiel“, klarigis Kelly. „La batalmono estas 65 procentoj de la malneta enspezo. Vi estas novulo kaj tute nekonata. Vi kaj Danny dispartigos tiel, dudek procentojn ricevas vi kaj okdek da ili Danny. Tio estas ja justa, ĉu ne, Roberts?“



„Tio sufiĉas“, estis la respondo. „Vi devas akcepti tion, Roberts konsentis. „Vi ne havas nomon ankoraŭ, tion vi scias.“

„Kiom da mono ĉe 65 procentoj de la enspezo elvenos?“ demandis Rivera.

„Nu, eble kvinmil da, eble eĉ ok da“, interdiris Danny. „Proksimume tiel do. Via pagoparto estos ĉirkaŭ mil ĝis dek ses mil. Tute beleta sumeto por laŭorda tradraŝo fare de viro kia mi. Kion pensas vi pri tio?“

La respondo de Rivera prenis la spiron de ambaŭ.

„La venkinto ricevos ĉion“, li diris decide.

Fariĝis kviete kiel en tombo.

„Tio estas ja tiel, kvazaŭ oni volus forpreni bombonon de infano“, klarigis la manaĝero de Danny.

Danny skuis la kapon. „Mi estas tro longe en la negoco“, li opiniis. „Mi volas suspektigi nek la gvidan juĝiston nek la ĉeestantojn. Mi ne volas paroli pri vetperisto kaj pri certaj aferoj, kiuj okazas de tempo al tempo. Sed mi rajtas ja diri, ke estas malbona negoco por boksisto tia kia mi. Mi scias, ke mi venkos. Pri tio ne estas dubo. Sed mi povas rompi la brakon al mi, ĉu? Aŭ iu sentaŭgulo elglitigas min per ĉarolubrikaĵo, ĉu?“ Li skuis solene la kapon. „Ĉu mi venkas aŭ malvenkas – mi ricevos okdek procentojn. Kiel pensas vi, meksikano?“

Rivera skuis la kapon.

Danny eksplodis – nun fariĝis tro por li.

„Kio? Vi kota eta malpurulo! Mi emus tuj nun tradraŝi vian postaĵon.“

Roberts intermetiĝis per sia lanta hezitema maniero por malhelpi malamikajn agojn.

„La venkinto ricevos ĉion“, ripetis Rivera grumble.

„Kial vi volas tion nepre?“ demandis Danny.

„Mi povas venki vin“, vortiĝis la sincera respondo.

Danny eksaltis kaj ontis forĵeti la surtuton. Sed tio estis, kiel lia manaĝero sciis, nur blufado kaj pozo. La surtuto ne falis malsupren, kaj Danny lasis trankviligi sin de la aliaj. Ĉiuj simpatiis kun li. Rivera staris sola.

„Vidu foje, burleskulo“, enmiksiĝis nun Kelly. „Vi estas nenio. Ni scias, kion vi faris en la lastaj monatoj: Vi venkis kelkajn malgrandajn boksistojn. Sed Danny estas grandioza. Se oni vidos lin post tiu batalo denovan fojon en la ringo, temos pri la ĉampioneco. Sed vi estas tute malkonata. Ekstere de Los-Anĝeleso ankoraŭ neniu iam aŭdis ion pri vi.“

„Jen vi aŭskultos ion“, ŝultroleve respondis Rivera. „Post tiu ĉi batalo.“

„Vi ja ne supozas eĉ nur momenton, ke vi povas venki min?“

Rivera kapjesis.

„Nun aŭskultu foje, fariĝu prudenta“, diris Kelly insiste. „Pensu pri la reklamo!“

„Mi volas la monon“, respondis Rivera.

„Vi ne povas venki min, eĉ ne, se vi fariĝus miljara“, furiozis Danny.

„Kial vi do estas tiel obstina?“ demandis Rivera.

„Se la mono tiel facile gajneblas, kial vi do ne volas gajni ĝin?“

„Mi volas, Dio helpu al mi!“ vokis Danny subite konvinkite. „Mi mortbatos vin en la ringo, knabo mia, se vi tiel farse petolas kun mi. Pretigu la kontrakton, Kelly, la venkinto ricevos ĉion. Fervore reklamu en la gazetoj. Rakontu al la homoj, ke estas batalo inter du personaj malamikoj. Mi montros al tiu ĉi flavbekulo.“

La sekretario de Kelly komencis skribi, sed Danny interrompis lin.

„Unu momenton!“ Li turnis sin al Rivera: „Ĉu la pesado?“

„En la ringo“, vortiĝis la respondo.

„Nenion por fari, flavbekulo. Se la venkinto ricevu ĉion, la pesado estos morgaŭ matene je la deka.“

„Kaj la venkinto ricevos ĉion, ĉu?“ demandis Rivera.

Danny kapjesis. Tio decidis la aferon. Li do eniros la ringon en la plej bona konstitucio.

„Vi estas azeno“, diris Roberts al Rivera. „Danny tute certe venkos vin. Vi havas ĝuste tiom bonŝancoj kiel akvoguto en la infero.“

La respondo de Rivera estis bone kalkulita hatoplena rigardo. Eĉ tiun gringon li malestimis, kaj tamen li estis trovinta je Roberts la plej bonan el ĉiuj gringoj.

#### IV

Oni apenaŭ atentis Riveran, kiam li iris en la ringon. Li estis salutata nur per sporada malforta aplaŭdado. La spektantoj ne fidis pri li. Li estis la ŝafido, kiu estis gvidata de la potenca Danny al sia ekzekutejo. Krome la spektantoj estis seniluziigintaj. Ili estis atendintaj furiozan batalon inter Danny Ward kaj Billy Carthey, kaj nun ili kontentiĝu pri tiu mizera komencanto. La publiko montris sian misplaĉon pri la evento ankaŭ tiel, ke ili vetis du je unu aŭ eĉ tri je unu por Danny. Kaj la koro de vetanta publiko ĉiam estas je la flanko de sia mono. La juna meksikano sidis en sia angulo kaj atendis. La minutoj rampadis. Danny lasis atendi lin. Tio estis malnova truko, kiu ĉiam efikis al la komencantoj. Ili fariĝis ekscititaj, se ili tiel sidadis kaj atendis, plenaj de korpemataj divenoj, vidalvide kun senkompata fumanta publiko. Sed ĉifoje la truko ne funkciis. Roberts ĝuste rigardis: Rivera ne havas malfortan flankon. Li, kiu estis pli delikata kaj pli sentema kaj havis pli fajnajn nervojfibrojn ol ili ĉiuj, ne estis nervoza. La atmosfero de la malvenko jam antaŭe certa, kaj tiel afliktanta sian ĉirkaŭejon, ne impresis lin. Liaj

sekundantoj estis gringoj kaj fremduloj: kotuloj, malpura rubaĵo de la bokssporto, sen honorsento, sen forto. Kaj aldone lamigis ilin la sento stari flanke de la malvenkonto.

„Vi devas esti atenta!“ avertis lin Spider Hagerthy. Spider estis lia unua sekundanto. „Laŭeble eltenu tiom longe, kiom eblas – tion insistis Kelly al mi. Se vi ne faras tion, la gazetoj skribos pri blago kaj fiigas la sporton en Los Anĝeleso.“

Ĉio ĉi ne estis ĝuste instiga, sed tio glitis de Rivera kiel pizo de la muro. Li malestimis batalon, kiu temis pri mono. Tio estis la malamata sporto de la malamataj gringoj. Li mem sufiĉe ofte ekzercis ĝin, sed nur ĉar li estis malsata. La fakto, ke li estis kvazaŭ kreita por tiu sporto, signifis nenion al li. Li hatis ĝin. Kaj li ne estis la unua inter la homofiloj, kiu malkovras, ke li sukcesas en malestiminda okupo.

Li ne elesploris siajn sentojn. Li sciis nur, ke li devis venki en tiu batalo. Ne alie eblis. Sed post li staris forto, pri kiu la publiko eĉ ne songis. Kaj tiu inspiris tiun konvinkon al li. Danny Ward batalis por mono kaj por tiuj agrablaĵoj, kiujn la mono povas havigi al li en tiu ĉi vivo. Sed ĉio, por kio Rivera batalis, brulis en ties cerbo. Kiam li nun tute sola sidis en sia angulo de la ringo, kun vaste malfermaj okuloj, kaj atendis sian ruzan kontraŭulon, li havis ardajn kaj terurajn viziojn, kaj tiuj estis tiel klaraj kaj precizaj, kvazaŭ li travivus ilin.

Li vidis la blankajn murojn de la akvoenergia centralo de Rio Blanco. Li vidis la ses mil malsatajn palajn laboristojn kaj la sep- kaj ok-jarajn infanojn, kiuj laboraĉis por dek cendoj po tago. Li vidis la migrantajn mortulojn, la fantomecajn mortulajn kraniojn de la tinkturisto-laboristoj. Li memoris lian patron nomi la tinkturejon memmurdisto truo, ĉar jaro da laboro tie signifis la morton. Li vidis la bieneton kaj sian patrinon, kiu kuiris kaj kiu de matene ĝis vespere havis okupon en sia dommastrumado, sed tamen havis tempon karesi kaj ami lin. Kaj li vidis sian patron, granda, kun densa liphara barbo kaj

larĝa brusto, lian patron, kiu, pli afabla ol ĉiuj, amis ĉiujn homojn, sed kies koro tiom grandis, ke ankoraŭ sufiĉe da amo postrestis por la patrino kaj la malgrandan muchacho, kiu ludis en angulo de la patio. En tiuj tagoj li ne nomiĝis Felipe Rivera. Li nomiĝis Fernandez, kiel lia patro kaj lia patrino. Lin ili nomis Juan. Pli poste li ŝanĝis la nomon, ĉar li rimarkis, ke la nomo Fernandez estis malamata de la policaj ĉefoj kaj de la politikaj oficejoj.

La granda, varmkora Joakino Fernandez! Elstaran lokon li okupis en la vizioj de Rivera. Tiam li ne komprenis tion, sed se li nun retrorigardis, li komprenis. Li povis vidi lin, kiel tiu metis en la eta presejo litertipojn aŭ ĉe la pupitro haste kaj nerveze skribadis senfinajn zigzagajn liniojn. Kaj li memoris pri la strangaj vesperoj, kiam la laboristoj sekrete, kiel homoj, kiuj intencas malbonon, en la malhelo ŝtele aliris kaj dum horoj parolis kun li, dume la muchacho ofte sen trovi dormon, kuŝis en sia angulo.

Kvazaŭ kiel el granda foro li aŭdis la voĉon de Spider Hagerthy, kiu diris al li: „Do ne tuj dekomence rezigni. Tio estus kontraŭ la instrukcioj. Akceptu vian tradraŝon kaj faru ion por via mono.“

Dek minutoj estis pasintaj, sed li ankoraŭ nun sidis en sia angulo. Oni vidis nenion de Danny, kiu eluzis sian trukon ĝisekstreme.

Sed antaŭ Rivera leviĝis pliaj vizioj. La striko de Rio Blanco, la malsato, la migradoj en la montojn pro beroj, radikoj kaj herboj, kiujn ili manĝis, kaj kiuj havigis stomakajn spasmojn kaj ventrodolorojn al ili. Kaj tiam la terura okazaĵo: La soldatoj de la generalo Rosalio Martinez kaj de Porfirio Diaz kaj la mortigaj fusiloj, kiuj neniam volis ĉesi kraĉi morton kaj pereon kaj celis dronigi la pekojn de la laboristoj en la propra sango. Kaj la nokto! Li vidis la malaltajn ĉarojn, sur kiuj la mortintoj estis tavoligitaj, antaŭvidita por Vera Cruz, kiel manĝo por la ŝarkoj en la golfo. Li revidis sin grimpi trans la makabran monton de mortintoj por serĉi kaj trovi la patran kaj patrinan kadavrojn je duono malvestitajn kaj perforte traktitajn. Precipe klare, li

memoris pri sia patrino – nur ŝia vizaĝo elrigardis, la korpo estis kaŝita de la ŝarĝo de dekoj da mortintoj. Denove knalis la fusiloj de Porfirio Diaz, kaj li vidis sin forkuregi kiel persekutitan montkojoton.

Laŭta muĝado kiel de la maro sonis al liaj oreloj, li vidis veni Danny Wardon je la pinto de lia sekvantaro el trejnistoj kaj sekundantoj tra la irejo en la mezo. La publiko muĝis pro entuziasmo. Ĉiuj jubilis al li. Ĉiuj estis por li. Eĉ la sekundantoj de Rivera elspiris malŝarĝite kaj ilia humuro pliboniĝis, kiam Danny lerte kliniĝis sub la ŝnuregoj kaj paŝis en la ringon. Lia vizaĝo montris rideton post rideto. Kaj se Danny ridetis, ridetis ĉiu colo de lia vizaĝo ĝis la sulketoj en la okulanguletoj kaj profunden en liajn okulojn mem. Neniam oni vidis tian amindan boksiston. Lia vizaĝo estis enkorpiĝo de bonvolemo kaj kamaradeco. Li konis ĉiun. Li ŝercis kaj ridis kaj interŝanĝis trans la ŝnuregojn salutojn kun siaj amikoj. La aliaj, kiuj ne povis bridi sian admiron vokis laŭte: „Danny!“ La bona humuro kreskis kaj elfurioziĝis en aplaŭdaj stormoj, kiuj daŭris minutojn.

Rivera restadis neatentate. Spider Hagerthy kliniĝis kun ŝvelinta vizaĝo super lin.

„Ne ektimu“, li avertis lin. „Kaj ne forgesu la instrukciojn. Vi devas elteni. Ne rezignu. Se vi rezignos ni poste tradraŝu vin. Komprenite, ĉu? Vi devas batali.“ La publiko ekaplaŭdis. Danny trapaŝis la ringon, rekte al Rivera kaj kliniĝis al li. Li prenis manon de Rivera inter siajn kaj premis ĝin per transfluanta bonkoreco. La publiko jubilis aplaŭde. Danny salutis sian kontraŭulon kun la karesemo de frato. Liaj lipoj moviĝis kaj la publiko ne povanta aŭdi la vortojn parolatajn komprenanta ilin ja afablaj, amindaj kaj en maniero de sportulo dirataj, kriis ree. Nur Rivera aŭdis la mallaŭte diritajn vortojn.

„Meksika eta rato, kiu vi estas“, elpenetris sible inter la ridetantaj lipoj „mi volas draŝi viajn intestojn el via korpo.“

Rivera ne moviĝis. Li ne ekstaris. Li rigardis la alian nur plena de hatu.

„Ekstaru, hundo“, hurlis iu en la fono de la spektantejo. La amaso komencis sibli kaj moke fajfi lin pro lia malmulte sportulmaniera konduto, sed li ne ekstaris.

Nova stormo de aplaŭdo salutis la boksiston Danny, kiam li moviĝis tra la ringo reen al sia loko.

Kiam Danny demetis la mantelon, oni vokis entuziasmigite „Ah!“ kaj „Oh!“ Lia korpo estis perfekta kaj abunde brilegis pro elasteco, forto kaj saneco. La haŭto estis blanka kaj glata kiel tiu de ino. Kaj sub ties surfaco ludis beleco, lerteco kaj forto. Tion li pruvis en dekoj da bataloj. Lia bildo iris tra la tuta sportgazetaro.

Kiam Spider Hagerthy detiris la lanan ĉemizon trans la kapon de Rivera, oni sibilis. Lia korpo pro la malhela haŭtkoloro ŝajnis esti pli etstatura ol ĝi estis en vero. Li havis muskolojn, sed tiuj ne tiom aspekteblis kiel tiuj de la kontraŭulo. Sed kion la publiko tamen pretervidis, tio estis lia profunda brusto. Kaj ĝi ankaŭ ne havis eĉ nur imagecon kaj ankaŭ ne povis havi ĝin – pri la persisteco de liaj muskolaj ligamentoj kaj pri la eksploda forto de liaj pugnoj. La ununura, kion la publiko vidis, estis brunhaŭta dekok-jara junulo kun korpo, kiu aspektis kiel tiu de knabo. Jen Danny estis multe pli impresa. Jen viro dudekkvarjara kaj lia korpo tiu de viro. La kontrasto estis eĉ pli okulfrapa, kiam ili staris unu apud la alia en la ringo kaj akceptis la lastajn atentigojn.

Rivera konstatis, ke Roberts rekte malantaŭ la sportraportistoj sidis. Li estis eĉ pli ebria ol kutime kaj lia parolo laŭe pli treniĝema.

„Estu do trankvila, Rivera“, diris Roberts. „Mortbati li ne povas vin. Tion ne forgesu. Li tuj komence ege atakos vin, sed ne lasu vin perpleksigi de tio. Bone kovru vin, staru firme kaj klinĉu. Tiukaze li ne tre povas damaĝi a vi. Imagu simple, ke li ekbatas vin en la trejnhalo.“

Rivera ne donis signon, ke li aŭdis tion..



„Grumbla diableto“, murmuris Roberts al sia apuda najbaro. „Tiel li ĉiam estis.“

Sed Rivera forgesis ĵeti sian kutiman venenan rigardon al li.. Vizio montris sin al li en formo de multnombraj fusiloj. Ĉiu vizaĝo en la spektantejo de la plej multekostaj ĝis la la plej lastaj lokoj tute malantaŭe - tiom distance kiom li povis rigardi - estis tranŝanĝinta en fusilon kaj li vidis la meksikan limon antaŭ si - elsekigita, de la suno ekbruligita kaj tristiga, kaj je tiu limo la ĉifonitaj aroj, kiuj esperis la fusilojn.

Li atendis, rekte starante tute malantaŭe en sia angulo. Liaj sekundantoj estis rampintaj eksteren sub la ŝnuregoj kaj ili kunprenis siajn faldoseĝojn. Danny staris transverse al li en la kontraŭa angulo de la kvarangula ringo. La gongo eksonis, kaj la batalo komenciĝis. La publiko kriis pro ĝojo. Ankoraŭ neniam la publiko ĉeestis batalon, kiu komenciĝis pli konvinkige. La gazetaro pravis. Estis batalo inter furiozaj malamikoj. Tri kvaronojn de la distanco Danny trapasis per salto, por povi ataki la korpon de sia kontraŭulo, avanco, kiu klare perfidis, ke estis lia intenco vori la etan meksikanon kun haŭto kaj hararo. Li atakis ne per unu bato, ne per du batoj, ne per deko da batoj. Estis kirlovento de batoj, neniiga ŝtormo. Rivera kvazaŭ perdiĝis. Li estis ŝutkovrita, tombigita sub lavangoj de batoj, kiujn majstro de ĉie elpafis. Rivera estis vehemente ŝanceligita, balaita kontraŭ la ŝnuregojn, de la ringojuĝisto deiigita kaj plian fojon ĵetita kontraŭ la ŝnuregojn.

Ne estis batalo, estis buĉado, masakro. Ĉiu alia publiko krom tiu de boksbatalo, retenus la aeron en tiu unua minuto. Efektive: Danny sciis, kion li kapablas – estis grandioza ago. La publiko tiom certis pri sia juĝo kaj ĉe tio estis tiel ekscitita kaj antaŭjuĝa, ke ĝi tute pretervidis, ke la meksikano plu staris sur siaj piedoj. Ĝi tute forgesis la boksishton Rivera. Ĝi apenaŭ vidis lin, tiom li perdiĝis sub la kruela atako de Danny. Minuto tiel pasis kaj ankoraŭ plia. Tiam la publiko, en momento, kiam la batalantoj estis disigitaj, vidis klare la meksikanon. Unu lipo estis fendigita, lia nazo sangis. Kiam li turnis

sin kaj ŝanceliĝante ekklinĉis, oni vidis tie, kie li tuŝis la ŝnuregojn, ruĝajn striojn sur lia dorso, el kiu fontis la sango. Sed kion la publiko ne rimarkis, tio estis, ke lia brusto ne forte laboris, kaj ke liaj okuloj estis fridaj kaj trankvilaj kiel kutime. Tro da estontaj majstroj provis jam ĉe la tute ne dorlotiga trejnado per similaj kruelaj atakoj al li. Kontraŭ salajro de duono de dolaro ĝis 15 dolaroj po semajno, li lernis elteni – dura instruado, kiun li trairis.

Jen okazis io nekutima. La konfuziga pelmelo de pugnoj, kies detaloj oni apenaŭ povis sekvi, subite ĉesiĝis. Rivera staris sola tie. Danny, la terura Danny, kuŝis sur la dorso, lia korpo tremis, dume li lante rekonsciiĝis. Li nek ŝanceliĝis, nek li sinkis planken aŭ lante falis malsupren. La dekstra pugno de Rivera trafis lin, kiam Danny ŝvebis en la aero, kiel fulmo el serena ĉielo. La juĝisto mansignis al Rivera, ke tiu retiriĝu kaj kliniĝis super la falintan heroon, nombrante la sekundojn. La publiko de boksbatalo kutime salutas la faligan baton per aplaŭdo. Sed tiu ĉi publiko ne jubilis.

Ĉi ĉio venis tro netatendite. La sekundoj estis akompanataj de streĉita kvieto, kiu estis disŝirata per la triumfa voĉo de Roberts.

„Mi ja diris tion al vi, ke li boksas per ambaŭ manoj same bone.“

En la kvina sekundo Danny turnis sin pene al la vizaĝo, kaj kiam la juĝisto nombris la numeron sep, li apogis sin sur unu genuon, preta ekstari, tuj kiam „naŭ“ antaŭ la dek estis nombrita. Se lia genuo ĉe 10 ankoraŭ estus tuŝinta la plankon, jen li estus estinta elnombrita kaj perdintus la batalon. En tiu momento, kiam lia genuo estus leviĝinta de la planko, li estus rigardata kiel staranta, kaj en la sama momento Rivera havintus la rajton denove bati lin planken. Rivera ne pensis lasi neuzita tiun okazon. Li rondiris sian kontraŭulon, sed la juĝisto rondiris antaŭ li kaj Rivera rimarkis, ke la sekundoj, kiujn li nombris, estis tre longaj sekundoj. Ĉiuj gringoj estis kontraŭ li, eĉ la juĝisto.

Ĉe „naŭ“ la juĝisto puŝis Riveran tiel, ke li estis retroĵetata. Tio estis malsportula. Per tio al Danny fariĝis ebla restariĝi kun rideto. Duone kurbiĝinte kaj per la brakoj defendantaj la vizaĝon kaj la abdomenon, li ŝanceliĝis antaŭen kaj lerte ekklinĉis. Laŭ la reguloj de la bokssporto la juĝisto estus devigita solvi la kroĉiĝon de Danny, sed li ne faris tion, kaj Danny kroĉiĝis al li kiel konko en la puŝado de la ondofrapado, kaj Danny iom post iom refortiĝis. La lasta minuto de la rondo ekis. Se li eltenus ĝis ties fino, li povus ripozi tutan minuton en sia angulo. Kaj li eltenis kaj ridetis spite al ĉiu malespero kaj mizero.

„Vidu, Danny ridetas!“ kriis unu el ili kaj la publiko laŭte kaj malŝarĝite ridis.

„Damnitan puŝforton havas tiu bubaĉo“, Danny diris ĝemante en sia angulo al la trejnisto, dume liaj asistantoj kiel freneze prilaboris lin. La dua kaj la tria rondo estis lamaj. Danny, kiu estis frida kaj ruza boksisto, starigis sin kaj blokis por ripozi de la grava bato ricevita en la unua rondo. En la kvara rondo li ree estis tute la malnova. Kvankam li estis tre elĉerpita kaj konfuzita, lia bona fizika stato ebligis al li regajni sian forton. Sed li ne reproviz per sia murdema taktiko. La meksikano estis montrinta al li, ke ĝi ne efikis al tiu. Anstataŭ tio li nun prezentis siajn plej bonajn boksartifikaĵojn. En ĉiuj trukoj kaj pri sperto kaj trejniteco li estis majstro; eĉ, se li ne povis lanĉi ion decidan, li ja plu batadis al sia kontraŭulo kaj iom post iom lacigis lin laŭ ĉiuj reguloj de la boksarto. Li batis trifoje, se Rivera batis unufoje, sed ne estis decidaj batoj. La sumo de multaj batoj donu la decidon mem. Li admiris la novulon, kiu batis same bone per ambaŭ manoj, kaj kies pugnoj puŝis per miriga forto. Rilate la defendon Rivera montriĝis en la posedo de miriga tekniko de la maldekstra. Ĉiam denove, atakon post atako, ĝi elpafiĝis kaj terure lezis la buŝon kaj la nazon de Danny. Sed Danny adaptiĝis. Ĝuste tio estis, kio poste faris el li mondoĉampionon. Li povis laŭplaĉe ŝanĝi batalmanieron kontraŭ alian. Nun li pli proksimiĝis al sia kontraŭulo. Per tiu tekniko, kiu estis

precipe agrabla al li, fariĝis ebla al li eviti la maldekstran de la alia. Nun li plurfoje kapablis entuziasme furiozigi la publikon, sed la nigron de la celtabulo li trafis, kiam li per potenco hoko suprenlevis la meksikanon en la aeron kaj faligis sur la maton. Rivera ripozis sur unu genuo kaj uzis la sekundojn, sed interne li estis konvinkita, ke la juĝisto la sekundojn tre kurtigis por li.

En la sepa rondo denove sukcesis al Danny, lanĉi la diablan baton. Li tamen nur ŝanceligis Riveran. Sed en la sekva momento, kiam tiu staris senhelpa kaj sendefenda, li lasis traflugi lin per nova bato el inter la ŝnuroj. Rivera falis enmeze de la gazetistoj, kiuj levis lin kaj ekstere de la ŝnuroj transportis al ties angulo. Ĉi tie li ripozis sur unu genuo, dum la juĝisto haste nombris la sekundojn. Interne de la ŝnuregoj, tra kiuj li devis kaŭri por povi ree atingi la batalejon, atendis Danny. La juĝisto nek intermetis sin, nek li repuŝis Danny-on.

La spektantoj estis ekster si pro entuziasmo. „Mortbatu lin, Danny, lin mortbatu!“ oni kriis.

Dekoj da voĉoj plukondukis la krion kaj sonis kiel la milithurlado de lupogrego.

Danny faris sian plej bonan, sed kiam ne estis nombrite naŭ, sed nur ok, Rivera jam neatendite glitis inter la ŝnuregoj enen kaj savis sin per klinĉado. Nun la juĝisto tuj ĉeestis, deŝiris lin, tiel, ke li estis trafebla kaj li helpis al la boksisto Danny tiom ajn, kiom ajn malsportula juĝisto povas helpi al li. Sed Rivera eltenis la atakon kaj la kirlado foriĝis el lia cerbo. Ili ĉiuj estas samaj. Ili estas la malamataj gringoj, kaj ili ĉiuj estas malhonestaj. Sed eĉ en la plej teruraj momentoj lumis kaj radiis la vizioj en lia cerbo – longaj trajnoj kun vagonaroj, kiuj pumpumas tra la dezerto, prizonoj kaj karceroj, vagabondoj ĉe akvejoj – la tuta turmentiga kota panoramo, kiun li estis vidinta en sia vagado post la tagoj de Rio Blanco kaj post la striko. En belega brila vizio li vidis la grandan revolucion balai tra la tuta lando. La fusiloj

ĉeestis, ĝuste antaŭ li. Ĉiu unuopa vizaĝo de la malamataj vizaĝoj estis fusilo. Por la fusiloj li batalis. Li kaj la fusiloj estis unueco. Li kaj la revolucio estis unueco. Li batalis ĉi tie por la tuta Meksiko.

La publiko ekĉagreniĝis pri Rivera. Kial li ne akceptas la tradraŝon ordigitan al li? Kompreneble li estos venkita, sed kial li faras tiom da bruo pri tio? Nur tre malmultaj interesiĝas por li, kaj tio estis la difinita limigita procentaĵo de ludantoj, kiuj ludis riskan ludon. Kvankam ili certis pri la venko de Danny, ili tamen vetis kvar je 10 aŭ unu je tri favore al la meksikano. La vetoj konsiderindis, kiom da rondoj Rivera eltenus. Kelkaj eĉ facilanime vetis je tio, ke li ne eltenus sep, ja eĉ ne ses rondojn. Tiuj, kiuj kontraŭvetis, do jam gajnis kaj tiel feliĉe solvis la demandon rilate al la riskita mono, kaj nun ili aliĝis al la aliaj kaj jubilis al la meksikano.

Rivera ne volis, ke oni venku lin. En la oka rondo lia kontraŭulo provis vane ripeti la suprenhokon. La naŭa rondo denove perpleksigis la publikon. Enmeze de klinĉo Rivera liberigis sin per rapida fleksebla movo kaj en la malvastejo inter iliaj korpoj lia dekstra sagis el la profundo supren. Danny falis planken kaj eluzis la nombradon. La spektantoj ekteruriĝis. Li estis venkita en sia propra specialfako. Lia fama dekstra suprenhoko estis uzata kontraŭ li mem. Kiam li je naŭ ekstaris, Rivera ne provis trafi lin. La juĝisto ja tamen estus malhelpinta lin, kvankam li flankenpaŝis en la mala kazo, se estis Rivera, kiu ekstaru.

En la deka rondo Rivera metis la dekstran suprenhokon de la zono kontraŭ la mentonon de sia kontraŭulo. Danny pro kolero ekfuriozis. La rideto, estas vere, ne eĉ momenton forlasis sian vizaĝon, sed li reiris al siaj murdemaj atakoj. Sed kiom ajn li dancadis, li ne povis fari ion kontraŭ Rivera. Sed Rivera en la konfuziĝo kaj la tumulto trifoje plankenbatis lin. Danny ne tiom rapide reakiris siajn fortojn. Kaj en la dekunua rondo la afero fariĝis serioza al li. Sed de nun ĝis la dekkvara rondo li montris la plej bonan, kion li iam ajn montris en sia kariero. Li staris kaj celis la batojn, ŝparis siajn fortojn en la

batalo kaj provis regajni la fortojn, kiujn li jam aldonis. Krome li batalis tiom malregule, kiom kapablas fari nur sukcesa boksisto. Ĉiun artifikon kaj ĉiun trukon li uzis, li klinĉis, sed ŝajnis tion kvazaŭ estus hazarde. Li premis la boksgantojn de Rivera inter brako kaj korpo kaj metis sian propran ganton sur la buŝon de Rivera por preni de li la spiron. Se ili dense boksis korpon apud korpo, li siblis inter la diskrevitaj sed ridetantaj lipoj al Rivera abomenajn kaj neeldireblajn insultvortojn en la orelojn.

Ĉiuj, de la juĝisto la publiko prenis la partion de Danny kaj helpis al Danny. Kaj ili sciis, kion li intencis fari. Subigite de tiu surpriza nekonato, li metis ĉiun esperon en unu decidan baton. Li malfermis sian defendon kaj akceptis la batojn, li incitis sian kontraŭulon, ŝajnis atakojn kaj provis logi lin al tio, ke li nudigu sin tiom, ke tio permesas al li el tuta forto ekbati kaj venki. Kiel faris tion alia pli granda boksisto jam antaŭ li, li eble povis trafi sian kontraŭulon per dekstra aŭ maldekstra hoko sur la mentonon aŭ la supran stomakon. Li kapablis al tio, ĉar li estis konata pri sia puŝforto, kiu estis en liaj brakoj, tiom longe kiom li iel povis teni sin sur la piedoj.

La sekundantoj de Rivera en la paŭzoj inter la rondoj zorgis nur malmulte por li. Ili sekigis lin iom kun la mantukoj, sed havigis al lia anhela pulmo ne multe da aero. Spider Hagerthy donis al li konsilojn, sed li sciis, ke estis malbonaj konsiloj. Ĉiuj estis kontraŭ li. Li estis ĉirkaŭata de perfiduloj. En la dekkvara rondo li ree surplankigis la boksiston Danny kaj ripozis, dume la juĝisto nombris la sekundojn. El la alia angulo Rivera estis aŭskultinta suspektigan frustradon. Li vidis kiel Mikaleo Kelly iris al Roberts, kliniĝis al li kaj flustris ion al tiu. La oreloj de Rivera estis kiel tiuj de kato, en la dezerto ekzercita kaj li aŭdis fragmentojn de tio, kion Mikaelo diris. Li volonte volis aŭdi pli, kaj kiam lia kontraŭulo leviĝis, sukcesis al li tiel manovri, ke li ricevis la okazon por klinĉo ĉe la ŝnuregoj.

„Li devas“, li audis paroli Mikaleon, kaj Roberts kapjesis. „Danny devas gajni – mi perdus sumegon – mi vetis grandegan sumon – mian propran monon – se li eltenos la dekkvinan rondon, mi estos bankrota – la knabo agos laŭ tio, kion vi diras. Faru tion klara al li.“

„Kaj nun Rivera ne plu havis viziojn. Ili provis mistifiki lin. Ankoraŭ plian fojon li sendis Danny-on sur la plankon kaj ripozis, la manoj apogataj je la flankoj. Roberts ekstaris.

„Nun li estas kaputa“, li diris. Iru en vian angulon.“

Li parolis ordeme, kiel li ofte parolis en la trejnado al Rivera. Sed Rivera rigardis lin furioze kaj atendis, ke Danny ekstaru.

Kiam li en la minutojn longa paŭzo ree sidis en sia angulo, venis Kelly, la entreprenisto al Rivera kaj parolis al li. „Rezignu, damnita ulo!“! Li siblis mallaŭte. „Vi devas lasi ĵeti vin sur la maton, Rivera. Faru, kiel mi diras, kaj mi sekurigos al vi vian estontecon. La sekvan fojon mi lasos vin venki kontraŭ Danny. Sed ĉifoje vi devas lasi venki vin.“ Rivera per rigardo komprenigis, ke li aŭdis ties vortojn, sed li montris per neniu signo, ĉu li konsentas aŭ ne.

„Kial vi diras nenion?“ demandis Kelly kolere.

„Vi perdus en ĉiu kazo“, aldonis Spider Hagerthy. „La juĝisto ne lasos vin venki. Obeu al Kelly kaj lasu ĵeti vin!“

„Jes, lasu ĵeti vin, knabo mia!“ insistis Kelly. „Tiukaze mi helpos al vi ĝis la majstreco.“

Rivera ne respondis.

„Mi faros tion, tiel, kiel Dio helpu min, knabo mia.“

Kiam la gongo eksonis Rivera sentis, ke iu danĝero minacas lin. La publiko rimarkis nenion. Kion ajn povus esti – ĉiukaze estis interne de la ringo kaj tute en sia proksimo. Danny ŝajne regajnis sian pli fruan sekurecon. La optimismo, kun kiu Danny alvenis, ektimigis Riveran. Evidente ili estis entreprenontaj iun trukon. Danny saltis al li, sed Rivera evitis lin. Li sekurigis sin per tio, ke li retroiris paŝon. La alia atendis, ke li klinĉus. Tio estis je certa

grado necesa, se la truko sukcesu. Rivera retiriĝis kaj rondcirklis la kontraŭulon, sed li sentis, ke ĉe la kunpuŝo kiu pli-malpli frue devos okazi, la truko estos provata.

Kiam Danny ree sturmis antaŭen, Rivera kondukis tiel kvazaŭ li volus klinĉi. Sed en la lasta momento, kiam iliaj korpoj kunpuŝontis, li retrosaltis. Kaj en la sama momento eksonis el la angulo de Danny la voko: Faŭlo! Rivera estis mistifikinta ilin. La juĝisto hezitis nedecideme. La decido, kiun li lipe jam formis, falis neniam, ĉar knabovoĉo sur la galerio ŝrikis: „Trompo! Trompo!“ Danny laŭte insultis Riveran kaj sturmis al li, sed Rivera evitis lin dance. Rivera decidis nun ne plu celi al la korpo de la alia, per tio li riskis sian duonon de ŝanco gajni, sed li sciis, ke li, se li vere volis venki, devis eviti la proksiman batalon. Ĉe la plej eta kaŭzo ili kulpigus lin je „faŭlo“. Danny lasis ĉiun memgardemon flanken. Dum du rondoj li stormis al la junulo, kiu ne kuraĝis renkonti lin proksimbatale. Ĉiam denove Rivera estis trafita; li devis akcepti la batojn je dekoj, por eviti la danĝeran proksiman batalon. Ĉe tiu unika finsceno de Danny la publiko leviĝis kaj freneziĝis. Ĝi komprenis nenion pri tio, kio okazis. La sola, kiun ĝi povis vidi, estis, ke lia favorato tamen venkis.

„Kial vi ne batalas?“ ili kriis kolere al Rivera. „Malkuraĝa rato! Malkuraĝa rato! Ek, hundo vi! Mortbatu lin, Danny! Vi jam havas lin, draŝu lin!“

El ĉiuj en la tuta domo Rivera estis la ununura, kiu retenis sian sangofridecon. Laŭ temperamento kaj raso li estis la plej pasia el ĉiuj, sed li jam estis elmetita al multe pli grandaj ekscitiĝoj, ke tiu komuna, el dek mil gorĝoj krianta pasio, kiu ondon post ondo leviĝis, al li ne signifis pli ol la velureca frideto de somera vespero.

En la deksepa rondo Danny daŭrigis siajn atakojn, post vehementa bato eksanceliĝis Rivera, liaj manoj falis senhelpe malsupren, dume li malvoleme reŝanceliĝis. Nun pensis Danny, ke lia bonŝanco estas veninta. La knabo estis sub lia potenco. Per tiu komedio Rivera superruzis lin kaj trafis lin kun la



rekta dekstra sur la buŝon. Danny falis. Kiam li ekstaris, Rivera falĉis lin per dekstra hoko al kolo kaj mentono. Tio ripetiĝis trifoje. Neniu juĝisto de la mondo povintus paroli pri faŭlo.

„Ho, Bill! Bill!“ Kelly insiste petis la juĝiston.

„Mi povas fari nenion tiel“ diris la juĝisto bedaŭrante. „Li ne donas al mi okazon por tio.“

Danny ĉiam denove stariĝis, disbatite, sed heroe. Kelly kaj aliaj en la proksimo de la ringo

komencis voki la policon, por ke ŝi intervenu, kvankam la angulo de Danny rifuzis ĵeti la mantukon. Rivera vidis kiel la dika serĝento faris nelertan provon sub la ŝnuroj engrimpi, kaj ne sciis vere, kio signifas tio. Tiuj gringoj sciis trompi je tiom da manieroj ĉe boksbatalo. Danny resurpiediĝinta, ŝanceliĝis nesezure kaj senhelpe antaŭ li tien kaj tien. La juĝisto kaj la policisto ambaŭ etendis la manojn al Rivera, kiam li batis lastan fojon. Ne estis kaŭzo interrompi la batalon, ĉar Danny ne plu restariĝis.

„Nombro!“ vokis Rivera raŭke al la juĝisto.

Kaj kiam la nombrado estis finita, la sekundantoj levis la boksishton Danny kaj portis lin en ties angulon. „Kiu estas la venkinto?“ demandis Rivera.

Malvoleme la juĝisto kaptis sian boksgantan manon kaj tenis gin supre.

Rivera ne ricevis bondezirajn salutojn. Sen akompano li iris en sian angulon, kie liaj sekundantoj ankoraŭ ne estis starigintaj la faldseĝon por li. Li apogis sin kontraŭ la ŝnuroj, rigardis ilin furioze, fiksis la rigardon al ili kaj lasis ĝin tiam rondiri preter la dekmiloj de gringoj. Liaj genuoj tremis kaj li ĝemis pro elĉerpiteco. Antaŭ liaj okuloj ondadis la malamataj vizaĝoj tien kaj tien en kapturniga vomemo. Sed tiam li rekonsciiĝis, ke ili signifis fusilojn. La fusiloj estis liaj. La revolucio povis komenci.



Tradukis: Donjo, Frank & Cezar (klubo Karapaco)